

RECIMinfo

Bulteno de *Registrolibro de la Civitanoj de la Mondo*, número 03, marto 2006, 2 €

Okuloj direktitaj al U.N.

Dum 2003 okazis historia vortbatalo pri Irako. Post la afgana milito, ĉu komenciĝos dua milito pro la 11a de septembro 2001 ? La rezistoj de la plejmulto el la membraj ŝtatoj kontraŭ la militema volo de Georges Bush unuflanke kaj la persona engaĝiĝo de Kofi Annan aliflanke dum momento remetis la organizaĵon de Unuiĝinta Naciaro sur sian bazon. Tiu restarigo de UN baziĝis ankaŭ sur la monda popolo, kiu esprimiĝis kiel « civila societo » okaze de ĉiuj grandaj internaciaj konferencoj ekde 1992. Tiu popola partoprenado kulminis dum la jarmila forumo en Novjorko en majo 2000 : granda nombro da rekomendoj tiam estis transmetitaj antaŭ la Ĝeneralan Asembleon kaj estis adoptitaj : ili konsistigis la jarmilajn promesojn.

En tiu impeto da konfido de la monda popolo kelkaj eĉ ekpensis, ke fine venis la momento, kiam UN **sin provizos per 2a Ĉambro, reprezenta ĉambro de la monda popolo, kiu estos elektinta ĝin.** Novaj movadoj kreiĝis por tio, strategioj estis ellaboritaj, internaciaj kunvenoj kunvokitaj, raportoj eldonitaj, kaj ... plu nenio.

Ni rememoru ! Jam en 1948 dum la monda civitaneco estis komenciĝanta fenomeno, la kunordiga komitato tiam alskribis la Ĝeneralan Asembleon de UN pri siaj projektoj rilataj al la fondado de la paco. Respondis Dr Evatt, aŭstrala prezidanto de la Ĝenerala Asembleo de UN : « UN ne ekzistas por fari pacon, sed por

firmigi ĝin kiam la ŝtatoj estos organizintaj ĝin. »

La 15an de marto 2003, la Kongreso de la Popoloj skribis al la sekretario de Unuiĝinta Naciaro por rimarkigi al li, ke la nepovo de UN koncerne la militdeklaron en Irako, kompreniĝis pro la manko de monda parlamento demokrate elektita de la monda popolo. Kaj la respondo atingis nin post du monatoj sub leterfronto de la Ofico de respondoj al la publiko : la oficisto informis nin, ke la kreado de dua ĉambro ne estas antaŭvidita de la UN-ĉarto, kaj ke la organizaĵo ne estas favora al la koncepto mem de monda demokratio.

2005, jaro de la sesdekjariĝo de la organizaĵo, komprenigis al la tuta civila socio, ke tio atendata ne venos. Dum en sia finjara raporto de la jaro 2005 la sekretario de UN sin gratulis pro la grandaj progresoj havigitaj de la jubilea Ĝenerala Asembleo, la organizaĵoj de la civila socio troviĝis ĉagrenitaj : el la 130 reformproponoj faritaj de la Saĝula Konsilio estis adoptitaj nur kelkaj decidoj koncernantaj la funkciadon de la Sekurkonsilio ; neniuj aliaj reformoj estas atendeblaj antaŭ 2015 ! kaj la plenumo de la jarmilaj promesoj multe malfruiĝis. La elreviĝo estas granda.

Ni eltiru la lecionojn el tiu dolora travivo de la jaro 2005.

UN ekzistas, kaj ĝia ekzisto estas progreso pro la tuthomaro. Sed ĉu ĝia strukturo « inter-nacia » ebligas UN superi la apartajn interesojn de la naci-ŝtatoj, kiuj konsistigas ĝin, por alporti pacon kaj prosperon al la tuta homaro ? Tiun demandon jam de sesdek jaroj ni faras, kaj pli kaj pli evidentiĝas, ke ne UN finfaros la unuigon de la homaro ; ne UN dekretos pacon. Kaj siaflanke la ŝtatoj ne kapablas dekreti pacon, tio estas konsenti, ke la intereso de la tuthomaro superas la sumon de la apartaj interesoj de la ŝtatoj. **En tiaj kondiĉoj, la ĉefa aganto por la « transformado » de la promeso en realecon nepre iras tra la homaro mem, tra la civitanoj de la mondo, tra ĉiu el ni.** Kaj tio nun okazas, ĉar ni estas multaj, kiuj svarme laboras laŭ ĉiuj fakoj, en ĉiuj sencoj. Historie ni sukcesos, eĉ se ni ne kapablas scii kiam tio okazos. UN povos daŭri, sed la sukceso de ĝia estonta misio certigis nur se ĝi estos helpata de la homaro aŭ de ties reprezentantoj, do de monda parlamento reprezentanta ĉiujn civitanojn de la planedo.

Daniel Durand

En tiu numero :

Okuloj direktitaj al U.N.	p. 1
Bertha Von Suttner	p. 2
Nobel Pac-premio al IAEA	p. 2
4 paĝoj pri IKTAM	
Kial IKTAM	p. 3
Komunikaĵoj de Christiane Libouban	p. 4
La Alvoko de Hago de 1989	p. 4
Mediprotektado en tutmondiĝa erao	p. 5 kaj 6
Tutmondistaj novaĵoj, mallonge	p. 7
Kongreso de la Popoloj : ALVOKO al KANDIDATIĜO	p. 8

RECIM-info n-ro 3 estus eldoninta en julio aŭ aŭgusto 2005. Sed la jaro 2005 vere estis tre ŝarĝita por la volontuloj de Registrolibro, kun kiel pliaĵo kelkaj komputilaj prizorgoj, tiel ŝarĝita, ke tiu bulteno malfruiĝis je ses monatoj. Kelkaj el la aktivecoj estas sugestitaj de la enteno de la paĝoj 7 kaj 8, kaj por ricevi pli da detaloj, necesus ĉeesti la Ĝeneralan Asembleon de Mondcivitana Registrolibro en Parizo la 5an de marto, aŭ peti de ni la protokolon.

Tamen tiu malfruiĝo ne endanĝerigas la planitan kalendaron por la baloteleto al la Kongreso de la Popoloj. Partaj baloteletoj okazos en 2007. La kvanto da laboro por sukcesigi ĝin estas tute simple kolosa. Pli kaj pli ni bezonas vian helpon materialan, skriban aŭ financon. Vidu la paĝon 8 !

FOR LA BATALILOJN !

Bertha Von Suttner

Nun oni prononcas la nomon de Bertha Von Suttner nur kiel verkintino de la libro « For la batalilojn! », kiu eldoniĝis en 1889 kaj pro kiu ŝi monde famiĝis. Ŝia vivo kaj ŝia agado estis tamen kun multe pli ampleksa graveco. Kiam aperis ŝia libro Eŭropo donis nemulte kuraĝigan spektaklon al la pacigantoj. Ĉie cirkulis militaj onidiroj, la vetarmado rapidiĝis kaj la loĝantaroj vivis en konstanta timo pro tiu militema frenezo.

Sed iam, literatura evento donis al ili subitan gravecon. Unu krio, unu alvoko sonoris tra la tuta mondo : « For la batalilojn! »

Kiu do aŭdacis fari tiel skandalan paroladon sine de ŝtato inter la plej fortaj militaj povoj en Eŭropo ?

Ĝi estis la voĉo de virino : **Bertha Von Suttner.**

Malgraŭ ŝiaj aristokrataj devenoj, Bertha Von Suttner devis fruaĝe perlabori sian vivon kiel guvernistino. En 1872 ŝi laboris dum nur 8 tagoj kiel sekretariino por Alfred Nobel en Parizo. 8 tagoj efikontaj, ĉar tiam komenciĝis reciprokajn estimon kaj admiron inter tiu iom magiesploranta kemiisto kaj Bertha, juna decidema kaj justama virino. Realvokite pro familiaj kialoj en Aŭstrion, Bertha edziniĝis nemulte poste kaj ekiris kun sia edzo en orientan Eŭropon, kie ŝi instruis lingvojn, kaj provis verkadon, ĵurnalismon, kaj tiamaniere en 1889 ŝi eldonis libron « For la batalilojn ! ». Tiu libro, kiu cirkulis en ĉiuj medioj, demonstras la malfeliĉegan karakteron de milito tra la sentoj de sia heroino Martha, kiu perdis sian junan edzon dum aŭstra-itala milito. Sekve de tiu eldono, Bertha iniciatis vastajn kampanjojn de konferencoj kaj kongresoj tra tuta Eŭropo, kaj kun la Pac-movado, al kiu ŝi aliĝis, ŝi defendis la ideon de malarmado kaj de supernacia arbitracia aŭtoritato. El ŝia agado fluis du historiaj sekvoj :

- ◆ la diplomataj kaj militaraj medioj ne restis sensentaj al tiu pacisma kaj tutmondisma parolado, kaj rezultis el ĝi la alvoko de Hago de 1899, kaj pluraj « Packonferencoj ». Oni prepariĝis por kondamni militon kiel efikan rimedon por solvi la internaciajn konfliktojn. Eĉ se ŝia agado ne kapablis eviti la unuan mondmiliton, oni povas aserti, ke Bertha Von Suttner estis la inspirantino de la fondado de la Ligo de Nacioj, kaj de Unuiĝinta Naciaro.
- ◆ la dua sekvo de ŝia agado fontas el la koresponda amikeco, kiun ŝi zorgis kun Alfred Nobel. Tre emociita pro la libro « For la batalilojn ! » Alfred Nobel skribis al Bertha Von Suttner, ke iam li faros grandajn aferojn por ŝia movado. Tial Alfred Nobel fondis per testamento la Nobel-Pacpremiion, kies taskon de atribuado li konfidis al la norvega parlamento. Alfred Nobel elektis la norvegan parlamenton ĉar tiu lando estis la unua en la mondo, kiu enskribis en sian konstitucion, ke ĝi estas favora al la kreado de supernacia arbitracia aŭtoritato. La tutmondisma mesaĝo de Bertha Von Suttner



estis bone komprenita.

Antaŭ cent jaroj, en 1905, la Nobel-Pacpremio estis atribuita al Bertha Von Suttner. Pro tiu okazo, norvega ĵurnalo faris la jenan komenton : « Kiel apostolino de Paco, Bertha Von Suttner nombriĝas inter la plej grandaj bonfarantoj de la homaro ».

La cenjariĝo de la atribuado de tiu premio estas por ni bela okazo por saluti la memoron de tiu eksterordinara virino, kies agadon ni daŭrigas.

DD

Fontoj :

« Nobel-Pacpremio : Kial ? Kiel ? » de Ursula Jorfald (1979)

Esperanta informservo NUN : <http://esperanto.nu/eLibrejo>

? Korespondado pri

Internacia Atom-Energia Agentejo IAEA

Prosper N. Kion vi opinias pri la ĉjaraj Nobel-premioj ?

Recim-info. Nobel-premioj ? Permesu, ke mi esprimiĝu nur pri la Nobel-pacpremio : krom kelkaj folozofiaj rezervoj pri la etiko adoptita de la norvega parlamento, mi plene aprobas la elekton de IAEA. Fakte unu el la gravaj minacoj por la venontaj jaroj estas la atoma terorismo. La laboro de IAEA iras en la senco de kiel eble plej vasta kontrolo de ĉio, kio koncernas la atoman energion. Tiun farmanieron oni devas kuraĝigigi, kaj ne la militemulojn.

P.N. IAEA neniam kondamnis la Hiroŝimajn bombojn. Plie la granduloj libere daŭrigas la atomvetadon, invitante en la rondon nur la « amikojn » dum IAEA ne moviĝas. Sed se ĝi estas noto kiel « povas plibone fari », prave.

R.I. Viaj observoj pri la neaktiveco de IAEA estas ĝustaj, kaj ili trafas la problemon, kiu okupas nin, nome, ke ĉiuj « internaciaj » burooj, agentejoj kaj organizaĵoj, ĉu dependa de UN ĉu ne, estas nur konstataj, konfrontaj kaj bonintencaj spacoj. Tiuj burooj, agentejoj kaj organizaĵoj ne estas mondjuraj establoj kapablaj kondamni, malpermesi aŭ puni. Ne, ĉar nun ne ekzistas monda juro. Kaj ĝuste manke de supernaciaj institucioj kapablaj eldiri la mondan juron, la civitanoj de la mondo opiniis nepre necese ekstarti kaj agadi ne atendante, ke la senpovuloj naskos frukton kontraŭan al sia naturo.

Laŭ tiu vidpunkto kaj rilate al la malpermeso de militara atomaĵo, IAEA ne estas sufiĉa solvo. Al ni ja necesas alia stablo, kiu kondamnu Hiroŝimon kaj Nagasakon, kiu kondamnu ĉiujn militatomajn provojn, kiuj malebligu per leĝoj, juĝoj kaj policaj fortoj la disiĝon de atomaj armiloj al tiom da teroristaj manoj. Ni, veraj tutmondistoj agantaj por monda juro, igu tiun alian aferon naskiĝi el nia komuna volo. Nia tasko estas giganta kaj urĝa.

Internacia Konsilio por Tutmonda Aŭtoritato pri Medio IKTAM



KIAL IKTAM ?

Nia planeda medio danĝerumas !

Ni devas defendi ĝian pluvivon kreante politikajn kaj jurajn instrumentojn dotitajn per realaj povoj kontraŭ la pereigaj agadoj de la poluantoj.

Historia neceseco

Por pli bone kompreni la ekziston de IKTAM, necesas retroirigi la tempon ĝis la fino de la dua mondmilito :

Ruiniĝo damaĝis nian planedan socion inter 1939 kaj 1945, kiu nuligis la antaŭmilitan medion, en kiu la naturo floradis, kaj en kiu la kutimoj kaj tradicioj estis bone zorgataj en kamparana etoso ne zorgante pri poluado, krom en kelkaj industriaj basenoj.

Ĉirkaŭ du miliardoj da homoj normale vivis en ekvilibra medio, ja ne ĉiam sociale justa, kaj neniu imagis ke iam necesos antaŭgardi tiun medion tiam konsiderata kiel senfine ekzistonta.

Kaj naziismo aperis kun sia aro da kruelaĵoj. Ĝi detruis ĉiun tiaman bonstaton.

Ekde 1946-1948, la rekonstruado nepris por reloĝigi la senhejmajn homgrupojn, kaj ripari la komunikvojojn por faciligi la movojn de ĉiaj laboristaroj por revivigi la medion. En tiu denova periodo multaj civitanoj ribeliĝis kontraŭ la kruelaĵoj, kiujn ili ĵus suferis. Ili ne plu volis retravivi tiujn malhumanajn momentojn. Ili aktiviĝis por demokrata tutmondiĝo kaj por medio taŭga kun la pravaj aspiroj de la **homa personeco**. Ili sin deklaris "**civitanoj de la mondo**" kiel fundamento de frateco, de justeco kaj de solidareco inter ĉiuj popoloj en paca mondo.

Paralele al tiu sindeklarado favora al la paco, tiuj unuaj civitanoj de la mondo decidis ankaŭ sin dediĉi al la nova medio aperanta pro la renovigo de nia planeda socio. Ve, tiu nova pacperiodo estis markita per urbaj kaj agrikulturaj ŝanĝiĝoj kaj per industriaj konstruadoj, kiuj tute ne estas modeloj pri media plibonigo.

Urĝaj agadoj estis iniciatitaj ĉiudirekte aŭ pere de manifestacioj aŭ pere de medidifendaj asocioj. Dum la jaroj, kiuj sekvis tiun konsciiĝon, rapidega kaj poluanta industriiĝo instaligis en ĉiuj ŝtatoj de la mondo senskrupule medidifekta.

Konstatinte la netolereblan difektiĝon de la homa vivmedio tra la tuta tero, grupo da mondĉivitanoj kaj ekologiistoj fondis IKTAM en 1990. Tiu fondado sekvis la sukceson faritan unu jaron antaŭe kun la adopto de la Alvoko de Hago⁽¹⁾, en kiu oni retrovas niajn tutmondismajn postulojn pri medio. De tiam nia asocio ne ĉesis plendi ĉe la politikaj kaj ekonomiaj medioj por ke ili rekonu la urĝan neceson starigi tutmondan organizaĵon kapablan kiel eble plej juste solvi la grandajn problemojn pro medidifektado.

Tial ekzistas IKTAM !

La prioritataj medidifektoj estos elektitaj de IKTAM laŭ la graveco de la pereigaj efikoj sur la marojn, la arbarojn kaj la protektadon de la ozontavolo necesa por la antaŭgardo de la klimatoj kaj de la biodiverseco. Post la internacia konferenco de Rio-de-Janeiro pluraj aliaj mondaj konferencoj ellaboris tekstojn evidentigantaj la drivojn de la medio, bedaŭrinde ne proponante la kreadon de supera demokrata tutmondan aŭtoritato pri medio.

Konklude, IKTAM per siaj agadoj, siaj verkoj, siaj tekstoj kaj siaj kontaktoj konvinke laboras por rekonigi la absolutan necesecon starigi demokratitan tutmondan organismon por la antaŭgardo de la medio.

La prezidanto, Jerry Bourgeois.

(1) Alvoko de Hago : vidu en sekva paĝo

Laŭ opiniesploro farita de *Publimétrie*, 94 % de la demanditoj konsentis pri la kreado de tutmonda aŭtoritato pri medio, kondiĉe ke oni dotu tiun internacian organismon per strukturoj fonditaj sur nova tutmonda juro.

« Ĉiu homo devas partopreni en la antaŭgardo kaj la plibonigado de la medio »

(art.2 de la ĉarto pri Medio)

Cunamo

La cunamo de la 26a de decembro 2004 denove mondscale evidentigis la mankon de detektsistemoj en la landoj rekonitaj kiel riskantaj. Tamen ĝia detekto estus ebliginta ne nur limigi la materialajn damaĝojn, sed precipe savi homajn vivojn.

Samtempe la konstatoj pri tiu katastrofo prilumas la tujecon de la materialaj, homaj kaj financaj rimedoj komune metitaj de ĉiuj landoj, la mankon de monda strukturo kapabla regi tiajn fenomenojn por eviti malŝparojn, troaĵojn, ekspluatadon.

La naturo frontigas nin al la principo de realeco devigante nin vidi niajn neraciajn kondutojn. Ĝi defias nin fari la necesajn decidojn kun klarvida kaj konstanta konscienco por igi ilin aplikataj kaj respektataj.

Konvencio de Kjoto

Ni devas ĝoji pri la ekapliko ekde la 16a de februaro 2005 de la konvencio de Kjoto (1997), kiu devigas 38 el la plej industriaj landoj redukti de averaĝe 5,2 % sian atmosferan ellason de forcejefikaj gasoj ĝis 2012, enkalkulante la rearbarigon. Tiu konvencio estas tamen nesufiĉa sine de senbrida produktivismo ; necesas aliaj radikalaj konvencioj post 2012 por redukti la amplekson de la klimata ŝanĝiĝo.

« Internacia » aŭ « tutmonda » ?

La Prezidanto de la Komisiono de la Ĉefkonferenco de Johanesburgo (Sudafriko) de la 26a de aŭgusto ĝis la 4a de septembro 2002, bedaŭris, ke gvidanta elemento, kiel ekzemple tutmonda organizaĵo pri medio, ne pretigis la ellaboradon de tiu ĉefkonferenco por ke tiu ĉi ne estu nur aro da bondeziroj kaj malprecizaj netrudaj proponoj.

La internacia juro pri medio povas esti aplikata, respektata nur en en kadro de institucio kiel Tutmonda Aŭtoritato pri Medio rekomendita de IKTAM de la 5a de aprilo 1990 kaj ekde 1949 fare de Unuiĝo de la Civitanoj de la Mondo, kies tiama prezidanto estis Jerry Bourgeois.

Kvankam la internacia juro pri medio havas la meriton ekzisti, ĝi tamen estas bazita nur sur interŝtata aranĝo kaj devas superpasi tiun nivelon por certigi sian efikecon. La kialoj de tiu juro estas ligitaj al la daŭra disvolviĝo kaj al ekologia neinversebleco. Ĝi devas favorigi zorgemon kaj preventon pli radikalajn kaj pli kompletajn.

Tiu medifavora juro estas ofte preterpasita de la pr produktivismo kaj ties logikoj.

Kontrolo, ŝlosilo de mediprotektado

Nur institucio kiel Tutmonda Aŭtoritato pri Medio ebligos direkti, aplikigi kaj kontroligi tiuj internacian juron pri medio, kiu povas esti sintezita laŭ tri sektoroj :

- Ø Respekti la aplikadon de la ekzistantaj tekstoj kaj konvencioj ; igi operaciaj tiujn principojn ; fari novajn konvenciojn ; radikale redukti la ellasojn de la vitrejefikaj gasoj.
- Ø Fari mondan traktaton por malpolui, dispartigi kaj ŝpari sensalan akvon ; apliki la konvenciojn kontraŭ la altmara poluado por malpolui la maran medion ; fari radikalajn konvenciojn por la protektado de la arbaroj kaj de la biodiverseco ; favorigi la reuzadon de la poluantaj elementoj ; fari konvencion pri la renovigeblaj energioj.
- Ø Eltrovi la financajn, jurajn, sciencajn, teknologiajn, edukajn rimedojn, kiuj nun ekzistas aŭ kiuj estas kreotaj aŭ firmigotaj, sed kiuj necesigas fundamentan bazon kiel mondan organismon dotitan per povoj je la servo de la vivo, kiel rekomendas IKTAM.

CL

Kelkaj pripensoj kaj deziroj eltiritaj de la alvoko de Hago en 1989 :

? La rajto vivi estas je la bazo de ĉiuj pravaj deziroj de homoj. Ĝia garantio estas absoluta devo por la responsantoj de ĉiuj ŝtatoj en la mondo. Ankaŭ la vivkondiĉoj sur nia planedo estas nun minacataj pro la gravaj difektiĝoj de la atmosfero.

? Tiu alvoko instigas ĉiujn ŝtatojn en la mondo kaj la internaciajn organizaĵojn, kiuj havas prian kompetentecon subskribi kaj ratifi la konvenciojn pri la protektado de la naturo kaj de la medio.

? En tiu alvoko, la 43 subskribintaj ŝtatoj promesis « antaŭenpuŝi, en la kadro de Unuiĝinta Naciaro, la elvolviĝon de nova institucia « aŭtoritato », kiu por la antaŭgardo de la atmosfero, estos taskita lukti kontraŭ la plivarmiĝo, per helpo de ĉiuj efikaj decidoproceduroj eĉ se en certaj okazoj unuanima interkonsento ne estis atingita.

Alimaniere dirite, la subskribintaj ŝtatoj agnoskis la neceson pasi « en certaj okazoj » trans iu aŭ alia ŝtataj suverenecoj por trudi decidojn faritajn por la savado de la medio.

JB

Mediprotektado en tutmondiĝa erao

La grandaj temoj kaj ĉefaj ideoj, kiuj tendencas plifortigi la preparon de Tutmonda Aŭtoritato pri Medio pravigas internacian organizaĵon. Tio estas ebla interkonsento pri la evoluado de la demokrata tutmondiĝo.

Tiu ĉi ne plu estas la propraĵo de ekonomio tra kelkaj gigantaj transnaciaj societoj. Tute male ĝi trafas samtempe ĉiujn kampojn de aktiveco, kaj interalie la aferojn ligitajn al medio. De nun nedubeblas, ke al la mediaj problemoj la homaro devas havi la kapablon respondi per tutmondaj solvoj. Kvankam necesas, ke tiuj teknike taŭgaj solvoj estu ankaŭ politike kaj sociale validaj por ricevi ĉies konsenton.

Povoj kaj civitanoj

Tio ĉi estas punkto pri kiu necesas insisti ; ĉar la internaciigo de la decidocentroj iras kun "disatomigo", la korolaro de tiu tutmondiĝo havas kiel konsekvencon la aperon de novaj povaj kaj kontraŭpovaj formoj, kiuj lasas evidentiĝi la stariĝo de transnacia civila socio.

La publika opinio ne plu kontentiĝas per reprezentado fare de perantaj politikaj partioj. La amaskomunikiloj nuntempe ne plu spegulas la plej diversajn deklarojn pri principoj. Ĉie malpliĝas la tradiciaj formoj por mobilizi la publikan opinion. Ni nun ĉeestas la surscenigon de multeco da aktoroj el diversaj naturoj, interalie tra la asocioj, ofte senlandlimaj, kiuj reprezentas la novajn rilatojn inter la civitanoj kaj la ŝtatoj.

Tiuj organizaĵoj, ofte neŝtataj (NŜO), situas en la renkontejo inter socio kaj ŝtato, interalie pri la mediaj aferoj. Transpasante la landlimojn, ili trudas al la ŝtatoj "entrudiĝan rajton" de U.N. pri kiu oni tro malmulte parolis. Tiel la NŜO aktivaj pri la mediaj aferoj neniam kontraŭas al la rajteco de la registaroj. Ili estas en daŭra dialogo kun la ŝtataj strukturoj, kaj tio ekde la ĉefkonferenco de Rio en junio 1992, de kiam ili estas sisteme asociitaj en la grandaj internaciaj traktadoj pri medio. Multaj el tiuj organizaĵoj tamen akiris, krom rekono sur la ŝtata nivelo, veran rajtecon sur la politika nivelo.

La realeco de tutmonda aŭtoritato pri medio necesigas gvidanton, spite al la paradokso, ke IKTAM estas neŝtata iniciato. La ŝtatoj ne estas eviteblaj.

Noviga organizaĵo

Tutmonda Aŭtoritato pri Medio (TAM) povus havi la formon de klasika internacia organizaĵo laŭ la tipo de faka institucio de UN. Ekzemple PNUE (Programo de Unuiĝinta Naciaro por Medio) povus kunlabori kun la nova naturo de la internacia civila socio en oficiala procezo de kunaranĝado, traktado kaj decidoj.

Nur per la sukceso de la starigo de tia organismo la Tutmonda Aŭtoritato pri Medio estos tute noviga. La regado de la mediaj aferoj necesigas pintajn teknologiojn. La decidoj rilataj al tia regado devas esti bazitaj sur demokrataj funkciadoj el nova tipo. Temas pri partoprena demokratio konscia pri la neceseco de ekvilibro de la novaj vid-al-vidaj fortoj. Tiuj ĉi devas interveni en tre frua stadio de la decida procezo. La ŝtatoj en kunlaborado kun TAM devas sin devontigi fari la necesajn decidojn, aplikigi ilin kaj kontroli ilian aplikadon.

Certe estas, ke kelkaj partoj de teritoriaj kaj eksterteritoriaj maroj estas transformitaj en rubejojn de ĉiuj specoj, el kiuj la ĉefa rezultas de la petrolŝipoj dum navigado. La poluadoj estas sociaj fenomenoj kaj koncernas vivan bazon : akvo, aero kaj tero. La vivo de nia planedo kaj de la popoloj endanĝeriĝas : ĉiu civitano estas koncernata.

Mediprotekta kulturo

Tiu konsciiĝo devas konkretiĝi per kleraj elektoj bazitaj sur pintaj teknologioj. La satelita teledetektado havigas senprokrastan kartografion de la vundebleco de la planedo Tero kaj de ties vivmedio. Geostabilaj satelitoj evidentiĝas naturajn kaj industriajn katastrofojn kaj iliajn efikojn sur la vivon. Tiuj valoraj helpiloj nepre necesaj al la decidantoj, povas ebligi al ili la aranĝadon de urĝecaj planoj kaj la mastradon de la situacioj.

Nun la konstato kondukas nin al etiko : iri de la scienco-kono al la konscienco de la ĉiutagaj kondutoj.

Se etiko estas fundamenta, memkompreneble ĝi inkluzivas la respekton de certaj moralaj reguloj. Fundamentas, paroli pri tutmonda juro pri medio, kiu inkluzivas de nun certan homan bonfarton harmonie kun la naturo por lasi al la estontaj generacioj vivantan planedon, verdan kaj bluan.

La necesajn decidojn prenu la politikuloj kaj la parlamentanoj, asocie kun la demokrataj institucioj.

Internacia konvencio pri medio estus bazo por formuli la etikajn principojn regantajn la mediajn aferojn. Post tempo, estus eble paroli pri medifavora kulturo same kiel oni parolas pri "socikulturo" en la civila atoma kampo.

Tiu kulturo estus planeda civitismo. La instruado havas tiun respondecon instigi ekde plej frua aĝo ĉiun infanon al la bazaj agoj por protekti la planedon (honesteco, respekto, sekureco).

La ŝtatoj tro ignoris la mediajn aferojn eĉ se tekstoj, interkonsentoj kaj konvencioj estas verkitaj ; eble ili tro malfacile konsentas transdonon de sia suvereneco. Ni ja vivas en reala krizo de la plurflankismo. Dum reguligo estas necesa, ĝi implicas etikon en ĉiuj niveloj kaj ŝtataj kaj individuaj.

Monda strategio

En tiu kunteksto, kiaj povus esti la bazoj de Tutmonda Aŭtoritato pri Medio ?

Necesas unue difini la jurajn bazojn de monda institucio pri medio pere de monda strategio kaj de regionaj taktikoj.

La Tutmonda Aŭtoritato pri Medio povus fondiĝi sur :

1. mondaj observatorioj pri medio utiligantaj la teledetektadon kaj retan interagadon kun la laboratorioj tra la planedo ;
2. internacia tribunalo pri medio. Ekzistus en Italio fakaj juraj mekanismoj, kiuj povus

uziĝi kiel modeloj.

Tio necesigas :

- trovi mondscale komunajn valorojn pri la mediaj aferoj, pro la Norda-Suda problemaro.

- prudente agadi pro certaj naciaj ofendiĝemoj, interalie militaraj.

- reale informi la publikon pri la urĝeco de la efikoj ligitaj al la kolektivaj kaj individuaj difektadoj de la medio ; ĝin instigi per leĝaro al primediaj ĉiutagaj civitanaj agadoj.

Nia pluvivo dependas de la medio. Se la Tutmonda Aŭtoritato pri Medio apogas sin sur monda juro pri medio, samtempe ĝi estas planeda humanismo kies aktoro devas esti ĉiu ŝtato kaj ĉiu civitano.

La medio estas la kerno de nia vivo, sed ĝi ankoraŭ ne sufiĉe koncernas nin. Fakte la rezolucioj de la internaciaj konferencoj de Rio-de-Janeiro (1992), Kjoto (1997), Johanesburgo (2002) bedaŭrinde ne konvinkis ĉiujn ŝtatojn, el kiuj Usono. Tamen la ratifado de la konvencio de Kjoto fare de Rusio en novembro 2004, rezultigis ĝian ekaplikon ekde la 16a de februaro 2005, kun taksodato en 2012.

Tiu teksto estis ĝisdatigita sintezo de Internacia Konferenco pri la temo "juraj kaj politikaj aspektoj de Tutmonda aŭtoritato pri medio" kiu okazis en la Justicpalaco de Parizo la 21^{an} de oktobro 1995 sub la prezidanteco de Magistrino Corine Lepage, ministrino pri Mediaj aferoj.

Partoprenis en la redaktado de tiu kvarpaĝa informado pri IKTAM : Jerry Bourgeois, Christiane Libouban, Gaëtane Gillès de Pellichy, Florence de Galzain, Michel forestier. Pri la enpaĝigo, la subtitoloj kaj diversaj aranĝoj respondecas Daniel Durand.



www.recim.org/cilame

Conseil International de Liaison pour une Autorité Mondiale de l'Environnement

Internacia Konsilio por Tutmonda Aŭtoritato pri Medio

« CILAME »

(internacia asocio laŭ svisa juro)

Sekretariejo :

142 avenue de Versailles

75 016 PARIS, Francio

Ni savu nian planedon dum tio ankoraŭ eblas !

Mallonge

ASKOP

Post la Mulhuza kunveno, la **Konsulta Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj** (ASKOP) multe evoluis. Unuflanke ĝi plifortiĝis per la aliĝado de dek novaj organizaĵoj : Internacia Unuiĝo de Afrikaj Ĵurnalistoj, nordafrika kaj magreba filio (Bejaia, Alĝerio) ; Benina Centro por la Evoluigo de la Bazaj Iniciatoj BCEBI/CBDIBA (Bohicon, Benino) ; Asocio Junularo Solidara (Vagaduguo, Burkinio) ; Komunumaj vilaĝoj de Mont-Sagesse kaj Mfa (Kongolando) ; Amikoj de Demond Tutu (Kindu, Kongio), Tutmondista Komunumo de Kalonge, Monda Solidareco - Kune Agadi (Kalonge, Kongio) ; Internacia Urĝa Agado (Montpeliero, Francio) ; Azia filio de Asocio por Tutmondaj Konstitucio kaj Parlamento ATPK/WCPA (Chennai, Hindio). **Sume, 29 organizaĵoj.**

Aliflanke ĝi iom malfortiĝis pro la ekŝigo de Josep Ortega, kaj do la provizora fino de la ASKOP-a forumo.

La projektoj de ASKOP entenas plie : la organizadon de koncerto por soleni la kvardekjariĝon de la Alvoko de la 13 monde famaj mondcivitanoj (fare de la Franca Registrocentro de la Mondcivitanoj) kaj la starigon de Seminarioj por Tutmondistaj Studoj (fare de Mondcivitana Registrolibro).

Krome BCEBI deziras organizi ASKOP-an kunvenon en Bohicon (Benino).

? ASKOP, ĉe Mondcivitanoj, 66 bd Vincent Auriol, 75013 PARIS. www.recim.org/ascop.



Monda Solidareco kontraŭ la Malsato

- Ekzemplodonaj tutmondistaj strukturoj : Sekve de la nomŝanĝo, pri kiu ni raportis en la antaŭa bulteno, Monda Solidareco kontraŭ la Malsato profunde modifis siajn strukturojn. Sur transnacia nivelo MSM estas nun regata laŭ « Monda Federa Reglamente », kiu aranĝas per mutualista kaj kiel eble plej respektema maniero la tutan internan funkciadon de la solidareco. Tiu Monda Federa Reglamente estas metita rekte sub la kompetenteco de la Kongreso de la Popoloj tra « Monda Konsilio » nun konsistigata. Sur landa aŭ loka nivelo, MSM nombras du asociojn, unu en Francio kun sidejo en Gemeaux (apud Dijono), kaj unu en Togolondo kun sidejo en Sokode. MSM antaŭvidas plimultigon de tiaj asocioj dum la estontaj jaroj laŭ la bezonoj kaj spertiĝo.
- En 2005 MSM financis evoluoprojektojn en Kongio (2a parto de fiŝbreda projekto), projekton de kokbredado kaj alian de legomkultivado en Togolando, du kooperativajn grentenejojn en Burkinio, kaj unu urĝan helpon sekve de inundoj en Benino. Krome MSM disponigis al partnera benina NRO operacian kapitalon por mikrokreditoj. Ni rememorigu, ke la financaj rimedoj de MSM fontas nur el la kotizoj kaj la laboro de la membroj (1300 en 32 landoj).

? MSM, 1 ruelle Haute, 21120 GEMEAUX - www.globidar.org



Internacia Urĝa Agado

Bone konata de multaj civitanoj de la mondo, tiu organizaĵo ĵus aliĝis al ASKOP. Por IUA 2005 estis la jaro de la cunamo kaj de ĝiaj intervenoj je unua kaj dua urĝecoj en Srilanko. Ni planas pli kompletan prezenton de IUA en estonta RECIM-info.

? IUA/AUI, Domaine de Montcalm, 1401 rue de Fontcouverte, 34070 MONTPELLIER. www.aui-ong.org

Tutmondiĝoj

- Tre interesa kaj progresiga kunveno de la komisiono pri Tutmondiĝoj okazis en Parizo la 12an de marto 2005. Ni ne povis raporti pri ĝi pli frue, sed la enteno de tiu kunveno restas plene aktuala. Oni povas peti la protokolon al la bultena redakcio.
- Laŭ iniciato de Jacques Lefrançois, akcepto estis organizita la 4an de junio 2005 en la urbodomo de Stabroek (apud Antverpeno, Belgio) kun la partopreno de delegitaro de Mondcivitana Registrolibro kaj de la komisiono pri Tutmondiĝoj.

- Hindio. Lucknow 2004 kaj 2005

La « Montessori » lernejoj en Lucknow (Hindio) nombras 28 000 lernantojn. En tiu aro da lernejoj, la direktoro Jagdish Gandhi fondis Fakon por Tutmonda Unuiĝo kaj por Pac-Edukado (World Unity and Peace Education Department - WUPED). Ĉiun jaron, en decembro FTUPE/WUPED organizas konferencon de justicestroj. La celo estas atingi la kreadon de monda juro tra tiuj konferencoj. Samtempe kiel la justicestraj konferencoj okazas laborkunveno de ne-ŝtataj organizaĵoj por la kreado de monda parlamento kaj demokratio. Krom multaj lokaj partoprenantoj, la konferenco kaj la kunveno de NŜO allogas inter 250 ĝis 300 homojn el ĉirkaŭ 80 landoj. En 2004 Mondcivitana Registrolibro estis reprezentita de Liliane Metz-Krencker. En 2005 la estraro de ASKOP delegis Rob Wheeler (usona mondcivitano).

En 2004, estis havigitaj principa interkonsento por la tutmondiĝo de la Montessori lernejoj en Lucknow kaj alia interkonsento por la malfermo de mondcivitana registrocentro interna al tiuj lernejoj por partopreno en la estontaj balotelektoj al la Kongreso de la Popoloj. Krome la kunveno ellaboris unuan pledoprogramon al monda demokratio.

- Libio. Tripoli, februaro 2006

Ĝuste kiam ni elfinas la sendadon de tiu bulteno okazos en Tripoli kunveno organizita de Asocio por Tutmondaj Konstitucio kaj Parlamento ATPK/WCPA. Mondcivitana Registrolibro estos reprezentata de Liliane Metz-Krencker kun pluraj elektitaj Delegitoj al la Kongreso de la Popoloj.

Registrolibro de la Mondcivitanoj

Novaj korespondantoj

- Bulgario : Ivanka Stoyanova P.K. 701 BG 9000 VARNA
- Benino : (krom Laurent Quenum en Cotonou) Patrice Lovesse, CBDIBA, BP 256, BOHICON
- Kongio : Urbain Kapoko Sumaili, avenue Lumumba, 171, KASUKU, KINDU Maniema
- Haitio : Michelet MICHEL, B.P. 15096, HT 6140 PETION-VILLE
- Italio : Giancarlo Rinaldo, Via Savonarola 65, IT 35137 PADOVA

Nova Registrocentro en Burkinio :

Souleymane Drabo, Alice Larou kaj Adèle Zoungrana konsistigas la estraron de la Registrocentro :

? Citoyens du Monde, pa/CAFES, 01 BP 6368, OUAGADOUGUO 01.

Okazis ankaŭ ŝanĝiĝoj en la konsisto de la estraroj de pluraj aliaj registrocentroj en Francio, Senegalio, Malagasio, Kalonge (Kongio), kio estas bonega signo de interna demokratio.

Male, ekŝiĝis : Fernand Thibaut (Belgio) kaj Mato Spekuljak (Kroatio)

Se vi deziras ricevi vian Mondcivitanan legitimkarton, sendu la ĉi-suban formulon plenigitan kaj subskribitan kun la monsumo : **15 € (8 € okaze de malfacilaĵo)** al la adreso indikita fine de tiu ĉi bulteno..

"Konscia pri miaj respondecoj kaj decidinte akiri la rekonon de miaj rajtoj kiel membro de la tutmonda komunumo, mi petas, plu gardante mian ŝtatanecon, esti registrita kiel **mondcivilano**".

NOMO (per majuskulaj presliteroj) FRAŬLINA NOMO
PERSONAJ NOMOJ Profesio
Naskiĝdato Naskiĝloko
Loĝeja adreso.....
Poŝta adreso (kesto).....
Poŝta kodo URBO, Lando :
la
(dato kaj subskribo)

- ◆ Laŭeble sendu vian **foton por legitimilo**
- ◆ **Indiku la lingvon** de via legitimkarto :
angla, araba, **Esperanto**, franca, germana,
greka, hispana, itala, japana, nederlanda, portugala,
sveda.

Serĉatas volontuloj !

Ni bezonas sekretariojn, tajpantojn, tradukantojn en diversajn lingvojn, pedagogojn, interretulojn, forum-animantojn, afiŝkreatojn, artistojn, organizantojn de seminarioj kaj prelegoj, korespondantojn, vojaĝantojn, verkantojn, arkivulojn, ktp.

Ĉu vi havas tian kompetentecon ? Ne hezitu eĉ dum unu sekundo, ekriatu kun ni !

? info@recim.org

(Daŭrigo de la paĝo 7)

Mondcivitana Registrolibro nun havas 40 korespondantojn kaj 11 Registrocentrojn en 40 landoj. Oni povas ricevi la kompletan liston laŭ simpla peto. Ĝi estas konstante ĝisdatigata sur Interreto :

? <http://www.recim.org/cdm/adres.htm>.

Se ne estas Korespondanto de Registrolibro aŭ Registrocentro en via lando, aŭ via regiono, ne hezitu ekriati kun ni !

ALVOKO POR KONTRIBUOJ

La Registrolibro de la Mondcivitanoj kontentus se ĉiu Civitano de la Mondo **jare** pagus monsumon egalan al **salajra aŭ enspeza duontago**. Komprenoble pri tiu "memvola mondimpoto" ĉiu mem taksas kiom li povas pagi, konsiderante siajn monrimedojn kaj la monsumojn, kiujn li krome jam pagas por la defendo de la tutmonda komunumo.

Enregistriĝo, abono, memvolaj kontribuadoj - aĉetoj

Pagmanieroj :

- Aŭ per ĝiro al la UEA-konto : civi-p.
- Aŭ al CITOYENS DU MONDE
CCP PARIS 2848 94 Y
IBAN : FR 46 30041 00001 0284894Y020 02
Bank Identifier Code : PSSTFRPPPAR
- Ni akceptas la eŭrajn ĉekojn sur francaj bankoj.
- Por la aliaj landoj, preferendas la internacia poŝtmandato, aŭ la interbanka ĝiro inkluzivante la ĉi supran IBAN-kodon
- Ni akceptas la bankajn **monbiletojn** (konverteblajn aŭ ne) enŝovitajn en koloran aŭ karbonan parperon, sub koverto ne registrita.

RECIM-info

Imprimé par nos soins
Le numéro : **2 €** (envoi compris)
Abonnement pour 5 numéros : **10 €**
Tirage : 4000 exemplaires
Comité de rédaction : Daniel Durand, Liliane Metz Krencker.
Directeur de la Publication : Daniel Durand

REGISTROLIBRO DE LA MONDCIVITANOJ
asocia sidejo :
66 bd Vincent Auriol, 75013 PARIS

Sekretariejo, (librotendado kaj bulteno ...) :
"Les Nids", **FR 49190 ST-AUBIN** (Francio)

www.recim.org



KONGRESO DE LA POPOLOJ

ALVOKO AL KANDIDATIĜOJ !

La **Kongreso de la Popoloj**, unua asembleo el rektaj reprezentantoj de terloĝantoj nombras 39 delegitojn elektitajn dum 10 sinsekvaj transnaciaj balotelektoj, en kiuj partoprenis sume ĉirkaŭ 100.000 voĉdonantoj el 120 landoj. Ĝi estas la antaŭprezento de monda asembleo kapabla establi mondajn instituciojn por pritrakti la grandajn problemojn de la homa specio. Ĉio estas detale klarigita en la antaŭa bulteno.

La Kongreso de la Popoloj nun atingis la momenton de sia renoviĝo. Tre oficiale la 4an de marto la proceso estos lanĉita dum « plena kunveno » en Parizo. **La balotelektado efektiviĝos dum la jaro 2007 kaj koncernos 13 elektotojn por naŭjara mandato.**

Por fariĝi kandidato, estos nepraj kondiĉoj. Tiuj ci estos komplete difinitaj la 4an de marto kaj estos publikigitaj en la tt-ejon de Kongreso de la Popoloj : esti voĉdonanto, do registrita kiel civitano de la mondo, esti aktiva tutmondisto de pluraj jaroj, do prezenti prian spertotabulon ; prezenti la programon por kiu oni sin devontigas okaze de elektiĝo, ktp.

La kandidatiĝoj estos validigitaj de balotelekta kontrolkomisiono, kiu konsistiĝos la 4an de marto. Por ĉiuj pliaj informoj, oni povas skribi al la bultena adreso, aŭ konsulti la tt-ejon de Kongreso de la Popoloj :

<http://www.recim.org/kdp/>